


Numero: 294.  
Novembro 2016.

24-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly



# La mondo renversigis

# Hieraŭ

Ankoraŭ nelonge ni esperis, sur nia terglobo estos eterna paco, kaj la homaro vivos en ĉiela feliĉo.

Homo ne murdos homon kaj ni ne fabrikos plu armilojn.

Antaŭ ni ŝvebis rozkolora nuboj, kiu lasis desegni al ni belan bildon pri la estonto.

Ni geesperantistoj estas emaj kredi, nia belega ideo sufiĉos por krei paĉan mondon.

Venis senluziĝo: ankaŭ Esperanto estas nur lingvo, kiu mem ne povas haltigi tankojn kaj bombojn. Se ni ne deziras ene en la koro sincere la paĉon, la mondo ne pliboniĝos.

Ion ni faras tre malbone. Estus bone scii, kion. – Eble, se ni scius, tiam ni estus pli proksime al la solvo.

Ĉu ni vere deziras paĉon aŭ la homaro estas kreita tiel, ke senĉese murdu unu la alian kaj, ni kaŭzu domaĝon al nia homfrato?

Kial mi estas tiom pesimisma? Mi ne scias ĝian kaŭzon. Eble la cirkonstancoj devigas al mi, ke en mia animo tiaj nigraj pensoj torturu min.

Ĉu ankaŭ aliaj homoj sentas ĉi tion? Ĉu ankaŭ ili nokte ofte turniĝadas pro tio?

Tio povas esti, ke aliaj vidas la mondon pli gaja kaj sugestas al mi forĵeti miajn malhelajn okulvitrojn.

Mi timas, ĝi ne estas nur mia problemo. Ankaŭ en la kapo de aliaj, tie estas ĉi tiuj teruraj pensoj.

La homaro volas liberiĝi de ili, sed ne eblas. La fantomo de la pereigo tie estas en la aero. Ĝi flugas kun la vento kaj kovras nian kapon, kiam matene ni rapidas al nia laborejo.

Ni nur povas esperi, ke ne okazos milito. Fine la homaro rekonsciiĝos kaj trovos la feliĉon en la paca kunvivado.

Kion ni geesperantistoj povas fari? Tio ĉi estas tre malfacila demando.

Nun neniu atendu de mi, ke mi scias la respondon.

-Redaktanto-

Hodiaŭ ne. Ni malfruis. La jaroj forkuris kaj ni jam povas fari nenion.

Esperanto jam malfruis ĉi tiun trajnon kaj la bonega eblo estas tre malproksime de ni.

La angla lingvo superis la zamenhofan lingvon. Antaŭ ni ĉiu pordo fermiĝis. Eble nur malgranda restis por kelkaj fanatikuloj, kiuj ankoraŭ uzas ĝin. En praktiko ĝi ne estas utila.

Anstataŭ ĝi ĉiu lernas la anglan lingvon. La lingvolernejoj estas plenplenaj de homoj, kiuj deziras ellerni ĉi tiun lingvon.

Ĉu ili fine lernas ĝin? Se, jes, tiam, multaj homoj, kial ne povas kompreni sin eksterlande? Fakte la gelernantoj ellernas kelkajn gravajn vortojn, frazojn, eĉ esprimojn, sed nur tre malmultaj atingas la celon. Ili restas por ĉiam eternaj komencantoj, kiuj de tempo al tempo komencas lerni la lingvon. Dume la lingvoinstruistoj sorĉos multe da mono el ilia monujo.

La lingvolernado ne estas malmultekosta afero. Ĉefe, se oni devas lerni la elektitan lingvon plurajn jarojn.

Jes, nuntempe multaj gejunuloj komencas labori eksterlande. Mi ne volas diskuti, prave en Anglio oni povas ellerni la lingvon pli facile kaj pli rapide. Mi scias, la tie laborantaj homoj ellernas en iu nivelo la lingvon de Ŝekspiro, kio necesa por la laboro.

Ĉi tio ne estas mia opinio, konataj lingvistoj kaj sciencistoj konstatis, tiuj ĉi laboristoj komencas paroli ian miksolingvon. Vere ĝi plifaciligas la laboron kaj la ĉiutagan paroladon kun la lokanoj.

Veran lingvoscion posedos nur la tria aŭ la kvara generacio.

Sed ĉi tio kondukas al la formorto de la lingvo de la prauloj.

Fine ĝin povus solvi la instruado de neŭtrala lingvo.

Super Esperanto ne forflugis la tempo, eĉ nuntempe estas urĝe bezonata.

-Ŝaŝa-



# Onklino Mari

Apáti Kovács Béla



Onklino Mari estis maljuna vilaĝanino. Jam depost jaroj ŝi vivis sola en sia malgranda dometo ĉe la vilaĝfino.

Ĝenerale ŝi estis kontenta. En la eta ĝardeno ĉio estis, kion ŝi bezonis por la vivo.

En la vendejo li aĉetis nur panon, farunon kaj diversajn spicojn.

En la birdokorto estis kelkaj kokinoj, anseroj, antaŭ kelkaj jaroj li havis ankaŭ porkon. Sed la porkonutrado estis tre laciga, tial ŝi ĉesis tion.

Se ŝi bezonis viandon aŭ viandaĵon ŝi promenis al la vilaĝa ĉiovendejo, kaj se ŝi havis bonŝancon, tiam ŝi ricevis ankaŭ porkoviandon. Se ne, tiam ŝi buĉis kokinon.



Ŝia edzo jam mortis antaŭlonge en laboreja akcidento. Ekde tiam ŝi estas vidvino.

La najbarino proponis, post la funebro ŝi serĉu alian edzon. En la vilaĝo estas multaj solaj viroj, kiuj volonte dividus sian vivon al ŝi.

Junaĝe onklo Mari estis belega. Ĉiu edzo turnis sin, kiam ŝi iris tra la unusola strato de la vilaĝo.

Neniu komprenis, kial ŝi elektis ĝuste tiun viron, kun kiu onklino Mari vivis pli ol dudek jarojn. Ŝia edzo estis drinkemulo kaj onidire li suferis akcidenton pro alkoholo. Krome li ofte batis ŝin, se hazarde li drinkis tro multe.

Ili ne havis infanojn. Komence, kiam ili sciigis pri la tragedio, ke ŝi neniam povos naski bebon, onklino

Mari proponis al sia edzo, ke ili adoptu malgrandan knabeton kaj ili eduku la etulon, kiel sian propran.

Kiam la viro ekaŭdis la proponon, li koleriĝis kaj elkuregis el la domo. Tri tagojn li forestis.

La vilaĝanoj rakontis, oni vidis lin en la proksima urbo, kie li diboĉadis kun drinkejaj kamaradoj.

Post la hejmeniĝo la viro tute ŝanĝiĝis. Apenaŭ li parolis kun sia edzino. Preskaŭ ĉiu vespere li sidaĉis en la drinkejo.

Ŝi vane petegis al li, ke li ne faru tion. La edzo ne atentis pri ŝi, eĉ se onklino Mari predikis tro longe li batis ŝin.

Foje ankaŭ la vilaĝanan policiston oni devis voki. Sed li estis la drinkeja kamarado kaj pro tio okazis nenio.

Vere la edzo tiam promesis, plurfoje li ne batos ŝin, sed tiu ĉi promeso daŭris nur unu aŭ du semajnojn.

Malgraŭ tio onklo Mari amis sian edzon. Neniu scias, kial? Alia virino jam eksedziĝintus de li.

Ŝi fidele toleris la insultojn kaj batojn.

Kiam la edzo mortis, onklino Mari fariĝis tre trista. Monatojn oni apenaŭ vidis ŝin. Ŝi evitis la homojn. Ŝi ne emis babiladi kun la najbaroj. Printempe kaj somere ŝi silente laboradis en la ĝardeno.

En la vintraj monatoj la pordo kaj fenestro de ŝia dometo ĉiam estis fermita.

La najbaroj timis, ke ŝi pendumas sin. Tiutempe tiu ĉi sinmortigo estis tre moda en la vilaĝo.

En la lastaj kelkaj jaroj ankaŭ tri aŭ kvar homoj tiel finis sian vivon.

Oni petis la pastron, ke li parolu kun ŝi. Antaŭ la morto de sia edzo onklino Mari ofte vizitis preĝejon. Vere ŝi ne estis tro religiema, nur dimanĉe kaj festotage ŝi kutimis preĝi kun la aliaj vilaĝanoj en la preĝejo.

Unue ŝi ne donis vivsignon je la voko de la pastro. Ŝi mute sidis en la ĉambro kaj ploris. La servisto de Dio longe petegis ĝis la pordo malfermiĝis.

-daŭrigota-

*(En Hungario Mari estas la petolnomo de Maria)*



# POEZIO

Esperanto estas grandioza lingvo, kiu havas riĉan literaturon.

Nia lingvo ofte estas akuzita ke ĝi ne povas traduki poemojn kaj aliajn literaturaĵojn de la mondo.

Tion diras nur la malamikoj de la zamenhofa lingvo.

Vidu kaj legu la sekvajn versojn!

## Majo

Majo rida majo sur Rejn' en boato  
Belaj sinjorinoj rigardis de monto  
Tiome belas vi boato glitas for  
Kial je l'salikoj venis tioma plor'

Senmoviĝis foren fruktarboj florantaj  
Petaloj falintaj el la arboj majaj  
De ŝi kiun amis mi jen estas ungoj  
Petaloj velkintaj de ŝi la palpebroj

Lente sur bord' sur voj' paŝis laŭlonge river'  
Urso hundo simi' en ciganirantantar'  
Azenotiritan ruldomon sekvantaj  
Dum flue foriris en vitkampoj Rejn-aj  
Surfifre luditaj arioj armeaj

Majo rida majo ornamis ruinojn  
Per heder' per rozuj' per floroj abunde  
Agitas vimenojn Rejn-a vent' surborde  
Parolemajn junkojn kaj vitflorojn nudajn

Wilhelmo Apollinaire - « Alkoholaĵoj »



## (Victor HUGO – “Les Contemplations” I; 21)

Ŝi ne havis ŝuon, ŝi ne havis kufon,  
Nudpiedsidanta inter junkoj klinaj.  
Mi pasanta vidis ŝin kiel feinon.  
Diris mi : « ĉu kun mi iros vi en kampoj ? »

ŝi rigardis al mi per la lasta rigard'  
Kiu belulinon venkitan plu gardas.  
Kaj diris mi : « ĉu vi, amemas tiu mond'  
Volas ke ni iru sub la arba profund' ? »

La piedojn viŝis ŝi sur borda herbo,  
Refoje rigardis ŝi al mi pensante  
Kaj la petolanton belan kvitis dubo.  
Kiom sur arblaŭboj tiam kantis birdoj !

Kiom milde akvo karesadis bordojn !  
Ho ! veni mi vidis al mi de l'junka verd',  
Feliĉan, sovaĝan knabinon kun ekstaz'  
En okul' ridanta trans la harara taŭz' !

esperantigis Roland PLATTEAU  
21/4/2003 0 H 30



# Por infanoj



## Eta koko kaj la vulpo



En iu tago la vulpo malsatiĝis kaj ĝi deziris manĝi kokinon. Ĝi kaŝiris al la proksima vilaĝo, kie ĉe ĉiu domo estis kokinejo.

Nokte ĝi iris, ke neniu rimarku ĝin. La vulpo portis grandan sakon sur sia ŝultro por ke ĝi povu rabi multe da kokinoj. Ĝia familio estis granda kaj multaj vulpidoj atendis la bongustan kokinaĵon.

Alveninte la vilaĝon la vulpo iris al la plej proksima domo. Sed tie estis tri timigaj hundoj. Ne estus bone tuj fariĝi ilia ĉasaĵo. Ĝi iris plu por serĉi alian domon.

Ĉe la alia domo estis geedziĝa ceremonio kaj oni buĉis ĉiom da kokinoj por la festa tagmanĝo. La kokinejo estis malplena.

Trompiĝante ĝi forlasis ĉi tiun birdokorton.

Preskaŭ ĉe ĉiu domo estis problemo, kiu malebligis la ŝteladon.

La vulpo tre timis, ke sen kokinoj ĝi devos reiri al la arbaro.

Kion manĝos la vulpidoj kaj la familianoj, se la granda sako restos malplena.



Iom fore de la centro de la vilaĝo la vulpo ekvidis dometon. La mastro de la domo certe jam enlitiĝis, ĉar ĝi ne vidis lumon.

Krome en la korto ne estis hundo. Ĉio estis silenta kaj trankvila. Ĝi ŝatis tiajn domojn.

Baldaŭ ĝi trovis la kokinejon. Ĝi estis farita el ligno.

Jam ĝi antaŭĝojis kaj revadis, kiom da kokinoj estos en la sako.

La vulpo povis eniri facile en la korton. Sur la barilo estis sufiĉe granda truo.

Ĝi iris rekte al la lignokokinejo kaj ĝi malfermis la pordon. Ene estis almenaŭ tridek kokinoj. Ili ĉiuj dormis nepensante, ke danĝero proksimiĝas.

Ĝis nun ilin ankoraŭ ne vizitis vulpo kaj aliaj rabobestoj. Ili esperis ĉi tie ili estas en sekureco. Sufiĉas, se la dommastro fermas la pordon de la kokinejo.



La vulpo kontente alpaŝis la unuan kokinon. Sed ĝi ne kalkulis pri la eta koko, kiu sidis dormante proksime al la pordo.

La ruza besto prenis unue ĝuste ĝin. Ĝi suspektis nenion. Antaŭ ĝiaj okuloj ŝvebis bildo pri granda festeno. Ĝi invitos ankaŭ la najbarojn. Ili jam delonge ne amuziĝis.

La vulpo estis tiom ravita pro la sukceso, ke ĝi ne povis imagi la fiaskon.

Ne pensis, ke ankaŭ eta koko povos kaŭzi malagrablaĵon al ĝi.

La eta koko ne dormis. Ĝi gardis la kokinojn. Kiam ĝi ekvidis la vulpon, ĝi tuj atakis la neatenditan „gaston”.

Per siaj akraj ungegoj kaj forta beko fulmrapide bategis la vangon de la vulpo.

Krome ĝi laŭte komencis kokeriki, kiu vekis la domanojn.

La homoj kuregis kun bastonoj kaj diversaj iloj al la kokinejo.

La vulpo lasis tie la sakon kaj ĉion. Ĝi ne deziris, ke la homoj mortbatu. Ĝi elsaltis el la kokinejo kaj senhalte kuris ĝis la arbaro, kie ĝi ekripozis.

Ĝi estis tre malgaja, ĉar denove ĝi restis sen kokinoj.

La homoj apenaŭ povis dankegi la heroecon de la eta koko. Ĝi savis la vivon de la kokinoj.

La vulpo plurfoje ne kuraĝis iri al la domo, kie vivas la eta koko.

-Onklo Adalberto-



# Humuro

-Kio estas la absoluta malvarmo?  
-???

-Kiam kato rompiĝas ĉe stratangulo.

\*



\*

En juĝejo

Juĝisto al la atestanto:

-Diru, kiam vi rimarkis, ke tiu viroj estas veraj ŝtelistoj?

-Komence mi pensis, ke ili estas doklaboristoj, sed vidante, kiel diligente ili laboras, tuj suspektis, kiuj ili estas.

\*



Hodiaŭ mia telefono difektiĝis, tiel mi pasigis la tutan tagon kun mia familio. Ili aspektas tre simpatiaj homoj

\*

# Humuro

Bonŝance

Viro alvenas hejmen el la laborejo kaj ekscitite li komencas rakonti al sia edzino, kion aŭdis.

-Imagu karulino, hieraŭ mia kolego naive iris hejmen kaj li trovis sian edzinon kun fremda viro en la lito. Li tiom ekscitiĝis, ke tuj li mortis je kormalsano.

-Bonŝance via koro estas sana – diras la edzino.

\*



-Kiom enuiga tiu ĉi kuirprogramo en la kablokanalo....

-Ĝi ne estas televidilo, sed mikroonda forno, avo.

\*

-Mia bofilo estas tre bona homo – fanfaronas la bopatrino. – Ĉien li veturigas min per sia aŭtomobilo.

La viro rimarkas malgaje:

-Vere, sed ŝi ĉiam revanas.

\*